# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno.

Temo.

## Rabistoj kaj banditoj

Akirado de havaĵo de aliuloj pere de perforto aŭ minaco de la perforto akompanas tutan historion de la homaro. Plej multe al rabado helpis militoj kaj ĥaoso, kiun ili kaŭzis. Pri multaj rabistoj oni eĉ ne scias, ĉar oni ilin neniam kaptis, pri aliaj atestas oficialaj protokoloj pri iliaj esplordemandoj kaj ekzekutoj, sed pli ofte oni scias legendojn ol faktojn. Se ne ekzistus la banditoj, ni havus nek riĉajn beletron kaj folkloron nek belajn simbolojn de ribelo kontraŭ subpremo kaj maljusteco. Uzante ekzemplojn de konataj personecoj (Jan Jiří Grasel, Václav Babinský, Ondráš el Janovice, Juraj Jánošík, Oleksa Dovbuš, Michal Vdovec, Nikola Šuhaj) oni povas demonstri diferencojn de kondiĉoj kaj metodoj de la rabado okcidente de rivero Morava kaj en Karpatoj. Kiuj estis diferencoj inter rabistoj kaj banditoj? Kiujn motivojn ili havis? De kie ili devenis, kiel agis kaj kiel mortis? Ĉu vere ili "prišteladis riĉulojn kaj pridonacadis malriĉulojn"?

**Kiam:** la 18-an de februaro 2026 je **18.00** (UTC+1), la klubejo estos malfermita ekde 17.45

**Prelegonto**: Oldřich Arnošt Fischer

**Lingvo:** esperanto

**Kie:** Občanský klub, Hybešova 65a, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato

Hybešova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la . La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

Ĉeesta renkontiĝo, ĝi estos registrata.

★

# Ni rekomendas

- La 22an — 25an de majo 2026, Germana-ĉeĥa renkontiĝo, Olomouc. Informoj venos baldaŭ.
- 23an-26an de julio 2026 43-a Pola Esperanto-Kongreso, Bielsko-Biała, Pollando.
- La 1-an — 8-an de aŭgusto 2026 111-a Universala Kongreso de Esperanto, Graz, Aŭstrio

Ĉu vi scias pri esperantista programo, precipe internacia, kiu povus esti interesa por ni? Informu nin.

★

# Cetera programo en februaro

La 25an **Ĉeĥia trampa fenomeno** – Vladimír Türk, *on-line přes Jitsi,* v **18.30**

# Programo en marto

La 4an **Jarkunveno de membroj**, la klubejo

La 11an **Universala kongreso en Graz** – Ewald Schick (AT), kumuna renkontiĝo kun klubo el Gliwice, rete per Zoom, je la 19a h.

La 18an **Prezento de instrumetodo** – Anton Oberndorfer (AT), la klubejo

la 25an **La edzino de la tempvojaĝanto** (komparo de la esperanta kaj la ĉeĥa tradukoj) – Mirka Tomečková, *on-line přes Jitsi,* v **18.30**

Pripensu jam, kiel vi povus kontribui al la programo. Tute mankas programo en la klubejo ekde aprilo kaj restas ankoraŭ liberaj kelkaj datoj por retaj renkontiĝoj. Ne hezitu proponi. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos. Dankon

Esperantista klubo Brno

Bosonožská 323/15, Brno
Czech Republic

Vi recevis la mesaĝon, ĉar vi estas membro de Esperantista klubo Brno, ĝia favoranto aŭ vi petis aboni invitilojn de nia klubo. Se vi ne estas membro de la klubo, vi povas malaboni tiujn mesaĝojn.

Malaboni

SENT BY mailerlite